

N.E.L.E.* (Nederlandse Esperantistena Ligo)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Am. Jacquemitslaan, 37, Brussel/Belg.

FLANDRA
ESPERANTISTO
MONATA REVUO
ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.
Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Si — H. Rider Haggard	29,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
La Juna Vivo (1934-1935)	15,— »
Pallietter — F. Timmermans	35,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy.	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,— »
Examenopgaven	12,— »
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50 »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiunonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Adolf De Keyzer
P. van Humbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

Flandra Ligo Esperantista Ligkunveno.

Okazos la 27^{an} Septembro je la 10^a matene
en nia ejo: Breughel, Jacmainlaan Bruselo.
Ĉiu grupo nepre sendu delegiton.

Nur liganoj povos ĉeesti la kunvenon.

Tagordo: 1 - Raporto de la antaŭa kunveno.
2 - Financa raporto pri la kongreso.
3 - Administracia reorganizo de
la ligo.

(eksigo de la kasisto kaj elekto de anstataŭanto)

- 4 - Ĉekursoj.
- 5 - Provinca propagando.
- 6 - La revuo.
- 7 - Diversaj.

Esperanto in de Praktijk.

ARGENTINIE

De aanduidingen, welke voorkomen op de speciale omslagen en het dito briefpapier voor de luchtpost, zijn in verschillende talen gesteld, w. o. Esp.

Docent Dr Jaime Scolnik spreekt regelmatig in Esperanto voor het microfoon van het zendstation te San Lorenzo.

DUITSCHLAND

De Preussische Akademie der Wissenschaften gaf haar goedkeuring aan het wetenschappelijk werk, in Esperanto, van Kl. Wiczorck.

FINLAND

De maatschappij der tramwegen te Helsinki, telt onder haar rijdend personeel 70 Esperantisten. Een vereeniging werd gesticht met het doel de kennis van Esperanto onder het trampersoneel te veralgemeenen.

FRANKRIJK

Door den minister van onderwijs, kunsten en wetenschappen werd J. van getroffen ten gunste van Esperanto. Voorstellen, tot het invoeren van Esperanto op de scholen werden in overweging genomen.

NEDERLAND

Door de minister van onderwijs, kunsten en wetenschappen werd J. van Andel, inspekteur voor het middelbaar onderwijs, aangesteld als staatsafgevaardigde bij het Nederlandsch Esperanto-examencomité.

Te Den Haag, werd aan de leden van het trampersoneel, welke het Esperanto-examen met vrucht aflegden, een geldelijke premie toegekend.

De « Federatie der Arbeiders-Esperantisten in het gebied der Nederlandsche Taal » telt 4.000 leden. De kursussen voor beginnelingen, door deze vereeniging in 1935 ingericht, telden 4.550 leerlingen, 1.350 personen volgden de lessen voor meergevorderden terwijl 700 jeugdige belangstellenden op de kinderkursussen inschreven.

Te Haarlem nam het stadsbestuur een voorstel in overweging, strekkend tot het invoeren van Esperanto op de scholen.

OOSTENRIJK

Dr Sirk werd als Esperanto-lector benoemd bij de technische hoogeschool van Weenen.

De talrijke officieele instellingen, tot het bevorderen van het toerisme in Oostenrijk, maken steeds ruimer gebruik van Esperanto. Een nieuwe reeks gidsen en vouwbladen werd onlangs in de internationale taal uitgegeven. « De Verkehrswerbung » verspreidde een rijk geïllustreerde gids van 32 bladz. met geografische kaart van Oostenrijk. Door den dienst voor vreemdelingenverkeer van Weenen, werd een prachtig prospectus uitgegeven welke o. a. aktueele en zeer nuttige raadgevingen voor toeristen behelst. Verder verschenen: een programma der Oosterijksche Brucknerfeesten, een merkwaardig prospectus nopens Karintie en een speciaal vouwblad over de hoofdstad Klagenfurt. Al deze uitgaven zijn uiterst verzorgd en met tal van merkwaardige fotos verlicht.

POLEN

Door de postspaarikas van Lwow werd Esperanto ingevoerd voor buitenlandse betrekkingen.

PORTUGAL

Het Portugeesch dagblad « Respublika » heeft een Esperanto rubriek geopend.

In de Polytechnische school te Lissabon werd Esperanto ingevoerd; zeventig studenten, der verschillende fakulteiten, leeren Esperanto.

SOVJET-RUSLAND

Door de kultuur-afdeeling van het centraal comité der Sovjet-syndikaten, werd bij al de syndikaten-vereenigingen aangedrongen op het verspreiden van Esperanto onder de leden.

Esperanto-lector Čehovič richtte een Esperanto-tooneelgezelschap op. Gedurende zes maanden werden voorstellingen gegeven in de Zuidelijke republieken der Unie.

TSJECHO-SLOWAKIJE

In 63 spoorwegstations werden borden aangebracht met aanduidingen in Esperanto.

Al niaj gelegantoj

Dum kunveno de Flandrema Grupo Esperantista, la grupanoj decidis ke baldaŭ aperos eble regule en la konata Antverpena gazeto « De Dag », artikoloj flandralingve pri nia movado. Pro tio, ni decidis ke la plimulto de la flandraj Esperantistoj kaj certe ĉiuj flandraj aŭ aliaj grupoj povus kunlabori al tiu klopodo. Por ke tiuj artikoloj estu kiel eble plej neŭtralaj kaj favoraj al la movado, ni interkonsentis kun la estraro de la gazeto ke ni ne subskribu per la nomo de nia grupo sed ke ili estos subskribataj de la nomo de S-ro Mortelmans. Li prenis sur sin la ĉefredaktorecon kaj respondecon de la aperontaj artikoloj. Helpu do al niaj klopodoj. Sendu novaĵojn, artikolojn, k.t.p. ne al la adreso de nia grupo sed *rekte* al S-ro Mortelmans, De Bosschaertstraat, 272, Antwerpen.

H. V. D.

Pripensu la vortojn de la Sankta Aŭgustino

Sur la unua paĝo de malnova angla gramatiko, eldonita antaŭ 150 jaroj mi trovas jenajn legindajn vortojn : « La diverseco de la lingvoj igas unu homon fremda de alia, kaj pro tiu sola lingva diverseco la cetere simila homa naturo neniel utilas ». (De Civitate Dei — Sta Aŭgustino).

Se mi neniam estis lerninta Esperanton, mi eble ne estus rimarkinta tiujn vortojn, kiujn oni devus presi sub la titolo de ĉiu gramatiko. Nun ili tiel min emociis ke mi neniam ilin forgesos.

Ĉi-sube sekvas la traduko de parto de la 19a libro, ĉapitro 7, de « De Civitate Dei — La Urbo de Dio », la ĉefverko de la Sankta Aŭgustino, skribita antaŭ ĉirkaŭe 1600 jaroj.

« Pri la diverseco de la lingvoj, kiu rompas la homan societaton : Post la urbo venas la mondo, kiun ili (la filozofoj) laŭorde metas sur la tria rango de la civila societo, ĉar ili komencas per la familio. Nu, ĉar la mondo estas pli vasta, ĝi ankaŭ estas plena de danĝeroj. Unue, kaj precipe, la diverseco de la lingvoj je ia maniero igas unu homon fremda al la alia. Ĉar supoze ke renkontiĝas du homoj, kiuj per sama lingvo ne scipovas interparoli, kaj ke ili estas devigataj resti kune, du mutaj bestoj, eĉ de malsimila speco, pli facile interkonsentos ol tiuj du vojaĝantoj, malgraŭ ĉia simileco de la homa naturo ; homo preferos la kompanion de hundo ol tiun de fremdulo. »

Adiaŭletero et Germanujo

Ĉiumonate Dresdena E-grupo sendis al la Brusela grupo la bultenon de la esperanto-vivo por la sekvonta monato.

Antaŭ kelkaj tagoj nia grupo ricevis la lastan numeron. Ĝi estas skribita en klara, simpla kaj kortuŝa stilo. Sajnas al mi ke ĝi interpretas la sentojn de miloj da sinceraj germanaj esperantistoj. Jen la teksto :

« Al ĉiuj, legantoj de la « Sciigoj » !

« Ni devas adiaŭi unu de la alia : Jen la *lasta* numero de la « Scii-
» goj ». Lastan fojon nia modesta informilo ligas nin, anojn kaj
» amikojn de la Dresdena grupo de la D.E.B. — (Deutscher Espe-
» ranto-Bund).

« Laŭ ordono de la plej alta Polica komandoro SS HIMMLER
» ĉiuj grupoj kaj unuigoj, kiuj celadas la disvastigon de artefarita
» lingvo, devas likvidi ĝis la 15a de Julio. Por la kazo, ke tio ne
» okazus libervole, devigaj rimedoj jam estas anoncigitaj !

« Do, lojalaj ŝtatanoj, kiaj ni estas ni nun mem metu la finstrekon
» sub multjara, kun granda idealismo farita Esperanto-laboro. Sa-
» me kiel ni ĉiam klopodis fari nian E.-devon, ni nun faru nian
» devon kiel germanaj viroj kaj virinoj.

« Mardon, la 14-an de Julio ni ankoraŭ unufoje kunvenas.

« La tagordo nur lasas la solan punkton :

« Likvido de la loka grupo.

« Ni petas ĉiujn niajn anojn, *nepre* veni. La gravega horo devas
» trovi fidelulojn kaj ne aron da ĝemantaj malfortuloj. Ĉiu devas
» montri lastan honoron al mortanta GERMANA ESPERANTO ASO-
» CIO.

« Post la fermo de la oficiala kunsido, kiu ne daŭras longe (eble
» 30-45 minutojn) ni ankoraŭ restos kune en senĝena babila rondo,
» por interŝanĝi rakontojn kaj travivaĵojn en Esperanto, ĉar la uza-
» do kaj parolado de Esperanto ja ne estas malpermesata.

« Se ĉiuj amikoj, ankaŭ tiuj, kiuj jam ne plu estas niaj membroj
» el iu ajn kaŭzo, ĉeestos tiun-ĉi lastan vesperon, ni tre ĝojos !

« Kaj nun, koran dankon al ĉiuj karaj kunlaboristoj kiuj dum
» jaroj kaj jardekoj fidele servis al nia afero ! »

VIVU ESPERANTO !

Finita : 10an de Julio 1936.

Ni devas nenion aldoni sed nur demandi, ke la flandraj esperan-
tistoj ne forlasu siajn Germanajn samideanojn kaj daŭrigu interri-
lati kun ili per persona korespondado.

G. BROODCOORENS.

Bibliografio

KAPTITAJ EN NUBIO : el « Durch die Wüste » de Hendrik Sien-
kiewicz esperantigita de Frato Wigbertus Van Zon, L. K.

Eldonis Jos M. Krijnen, Vught Nederlando.

Prezo broŝurita sv. fr. 2,10, bindita sv. fr. 3,10.

El la recenzo : La rakonto mem estas ekstreme interesa ; plurfoje
mi forgesis mian oficon de kritikisto, fortrenate de la dramecaj
fariĝoj.

La stilo de nia samideano Van Zon estas klasika, pure Zamenhofa.

Vere taŭga libro por niaj bibliotekoj.

Cseh-kursa anekdoto

REALECO KAJ SONGO

- Mi certe iros al la unua grupkunveno, Fraŭlino Delpano...
Kaj Vi ?...
La afabla knabino ridetis gaje, ekrigardis la junulon kaj respondis:
— Eble, jes, Sinjoro Randelo.
— Ne eble, fraŭlino... Nun ni estas esperantistoj, certe ankoraŭ
novbakitaj, sed ni tuj devas iĝi plenkreskuloj.
— Geplenkreskuloj !
— Jes... Do vi venos...
— Verŝajne...kaj nun ĝis la revido, sinjoro.
— Bonan vesperon, fraŭlino, ĝis la sekvonta Vendredo en la kun-
venejo.

Amike li premis la manon de la ĉarma fraŭlineto, alrigardis ŝin kamarade kaj feliĉe foriris...

Jam estis la dudekdua kaj duono, kaj hejmen venante li tuj iris al la ĉambro, enlitiĝis, dormis... kaj sonĝis :

Li estis kuŝanta sur herbajo, flanke de malgrasa erikejo. La nokto estis hela, sed ne sen iu miro, li konstatis ke ne estis la luno, sed granda verdeta stelo, kiu brilis super proksima arbareto, kiu nigre desegniĝis inter la blua, nokta ĉielo kaj la grizblua lando.

Sed subite el la pinaro fordancis tri grandaj, verdaj katoj. Iliaj dorsoj estis kurbitaj ĉiel ponto super Venezia kanaletoj, iliaj vostoj flirtis rekte kiel serpentoj antaŭ Hindaj fajfantaj sorĉistoj, iliaj okuloj flagris kvazaŭ aŭtomobilaj lanternoj, kaj mistere ili murmuris laŭ kadenco de negra jashando :

*Kato estas meblo.
Seĝo estas besto !
Ah ah ah ah ah !
Ne ! ĝi estas besto,
Ne ! ĝi estas meblo...
Ah ah ah ah ah !*

— Sed ambaŭ estas ĝi ! kriis Sinjoro Randelo.

La tri verdaj katoj dum momento silentis kvazaŭ ili miris pri la renkonto, sed tiam ili pli laŭte ridis kaj preterpasis.

Aperis nun granda griza azeno, dancanta sur la du malantaŭaj kruroj, kaj per la antaŭaj li forĵetis kiel jonglisto orajn ciferojn. Estis dufoje la cifero 1, kaj unufoje la cifero 3.

Kaj kiel pilko li ĉiam denove kaptis ilin, kaj kantis bas-voĉe :

*Unu kaj unu estas tri
Hi hi hi hi hi
Unu kaj unu estas tri
Tiel ja kalkulas mi !*

Kurioze, murmuris la fraŭlo... Kio nun venos...

Sed jam alproksimiĝis tri junuloj, kiujn li rekonis. Estis lernantoj, kiuj kun li sekvis la Cseh-kurson. La elektrikisto portis ruĝan

standardon, la forĝisto malgrandan kvadratan flageton, la lignajisto larĝan flavan paperon. Sed strange, la koloroj brilis kiel lampionoj. Nun aperis la profesoro kun malplena dika valizo, kiu estis lumigita per brulantaj kandeloj interne. Kaj ekstere sur la valizo li legis grandajn vortojn : KIU, KIA, KIO, KIE.

Nun aperis unu post la alia ĉiuj la viroj, kiujn li vidis dum tri monatoj, ĉiun semajnon dum du horoj : la horloĝisto, la friandaĵbakisto, la instruisto, la tajloro, k. t. p.

Ĉar subite li kun pli da intereso jam rigardis pluen, jen la dancistino, la kudristino, la instruistino, la modistino, kantistino kaj multaj aliaj... Sed li febre serĉis per la okuloj...

Kie estis la « oficistino » ?...

Ĉiuj preterpasis portantaj iun aĵon, kaj eĉ ne estis rimarkintaj lin... Kiel fantomoj ili kvazaŭ floris super la tero...

Sed kial li ne vidis fraŭlinon Delpano, kies baptonomo estis « Anĝela » ?

Jam denove la silenta nokto regis sub la majesta, verdstela brilo.

Se la tuta klaso estis tie-ĉi, ankaŭ Anĝela devis esti ĉi-tie. Li levigis, forkuris en la direkto de la pinarbareto el kio la lumsekvantaro aperis...

— Fraŭlino Delpano... li flustris... « Anĝela » li kuraĝis kribi. Sed nur la eĥo respondis...

Nenion... Sen hezito tamen li marŝis tra la mistera arbareto, kiu subite iĝis grandega arbaro.

— Anĝela !

Ses verdaj okuloj, kiel aŭtomobilaj lanternoj dangere flagris antaŭ li. Estis denove la tri verdaj katoj... Tamen li ektimis kaj pro tio... vekigis.

— Idiota sonĝo, li flustris, nur tio, kion mi deziris vidi ne aperis... Sed jen mia venĝo. Baldaŭ mi serĉos ŝin en la reala vivo, ĉar finfine sonĝo nur estas trompajo !

Kaj post tiu saĝa konstato li denove ekdormis trankvile.

P. S. — Kaj nun karaj gelegantoj, se vi neniam ĉeestis Cseh-kurson, iru, tiam nur, vi komprenos kiel estas eble tiel freneze sonĝi... Kaj vi, eks-Cseh-kursanoj, ne tro sonĝu pri verdaj katoj... aŭ pri la diferenco inter « lia » kaj « sia » ... ĉar tiam eble la sonĝo iĝus terura amromano !

L. VAN DER POEL

PORTU VIAN STELON !!
VARBU ABONANTOJN !!

Julius Baghy kaj Kolomano Kalocsay

En ĉi tiu aŭtuno pasos dudekkvin jaroj, de kiam la du plej grandaj poetoj de nia literaturo : Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, ekkomencis sian laboron por Esperanto.

Interese koincidas kelkaj gravaj datoj en la vivo de niaj du gvidantaj poetoj : ili naskiĝis en la sama jaro, 1891, ili esperantistiĝis en la sama jaro 1911, ili same estas hungaroj kaj same en Budapeŝto ili grupigas ĉirkaŭ si la modernan skolon de la esperanta literaturo. Ludo de la hazardo ! Esence kiom da diferencoj koncerne verkistan profilon, laborteronon, legantar-tavolon... Sed malgraŭ la diferen-



coj, kun kia egale hela lumo brilas sur la firmamento de nia lingvo tiu-ĉi ĝemela steloparo, kies malsamspeca radiado ne malhelpas, eĉ fortigas la brilon unu de la alia kaj sorĉas antaŭ niaj okuloj tian diboĉan fajroludadon, ke apenaŭ ni kapablas malfermi la okulojn tiel kutimigantajn al la modestaj meĉoj de nia malriĉa ĉielo...

En la siberiaj militkaptitejoj komenciĝis la eksterordinara esperantista kariero de *Julio Baghy* : tie li gvidis kursojn por diversnaciaj, tie vundiĝis por ĉiam lia sentema, justo-serĉanta animo pro la teruraĵoj de la bestiganta homo, tie formiĝis en li lia filozofio, kiun li

volis fari savilo ĝuste kontraŭ tiu bestigo, kaj tie li travivis kun elementa forto la internan ideon, tiun ĉi ĉefmotoron de ĉia Baghy-a verkado kaj ago... Poste li revenis al la patrujo kaj intense partoprenis en la postmilita movado, gvidis kursojn, formis grupon, aranĝis literaturajn vesperojn, k.t.p. Kaj venis la internacia labortereno : universalaj kongresoj, kiujn li partoprenis aktive kaj al kies spirita nivelo li signife kontribuis, kaj la rond-instruado Cseh-metoda, dum kiu li pruviĝis unu el niaj plej talentaj instruistoj. Instruisto, kiu ne kontentiĝas per la strikta prezento de la lernomaterialo ; instruisto, kiun neniam formuloj kapablas kateni ; instruisto, la lingvo, la Esperantismo mem ; instruisto, kies disĉiploj ne forlasas la movadon, sed restas fidelaj eĉ post jaroj, ĉar vivas en iliaj koroj kun flagranta flamo la sankta fajro, kiun ekbruligis ilia instruanto.

El ĉi tiu tre multflanka laboro rezultis, ke Baghy atingis ĉion atingeblan, kion tre malmultaj verkistoj atingas jam en sia vivo : li estas la plej populara homo en nia movado kaj liaj portretoj pendas tiom ofte en la klubejoj, kiom ofte nur tiuj de Zamenhof kaj pastro Cseh, kaj santempe li atingis la plej altan oficialan rekonon, fariĝinte jam antaŭ jaroj membro de la Esperantista Akademio.

Se iu petus min, ke mi koncize klarigu al li, kio ja estas tiu Baghy-a filozofio, pri kiu oni povas legi tie kaj ĉi tie, en recenzoj, studoj, foje por, foje kontraŭ : ja mi ne povus alie respondi : la in-

terna ideo. Jes ja, ĝi estas la esenca trajto de la homa kaj verkista sinteno de Baghy, ĝin li glorigas per sia por Esperanta agado, ĝin li enportigas pere de siaj verkoj, kiuj humile, sed konsecie portas sur si la devizon : « AMO KREAS PACON, PACO KONSERVAS HOMECON, HOMECO ESTAS PLEJ ALTA IDEALISMO ». Jes ja, tiu ĉi filozofio eble ŝajnas tro idealista, tro malfirmbaza, por nia sange reala epoko, ja aŭdiĝis voĉoj kritikaj, kiuj esprimis sian dubon pri la aktualeco de tia filozofio, sed ni konfesu sincere, ĉu la Baghya filozofio kulpas ? Aŭ eble la epoko ? ! Kaj ĉu ne ĝuste tia simpla elementa kredo, tia mondrigardo iom naiva, (ni ne timu la vorton ; trafumas mian kapon la naiveco de Sankta Johana en la Shaw teatraĵo). Estas eble tio, kio, pleje mankas al nia generacio, tiel blinde rapidanta al la abismo ?

La granda literaturhistoria signifo de la Baghy-verkaro konsistas en tio, ke per sia ekzisto ĝi pruvis la kapablecon de Esperanto por originala literaturo. Jes, estis ja antaŭ lia apero originalaj romanoj kaj originalaj versoj kaj estis unuopaj esperantistoj, kiuj ilin legis, kelkaj poemoj de Zamenhof kaj Grabowski iĝis jam komunaj trezoroj de la Esperantistaro, sed Baghy unue kapablis krei ĉirkau si legantan publikon, jam ne plu unuopulon, sed publikon en la vera senco de la vorto, legantojn, kiuj ne nur legas la librojn, sed parolas pri ĝi, komentas ĝin ; jes, Baghy alportis la novaĵojn : la apero de Esperanta libro estas socia evento. Kaj li faris ankoraŭ plian miraklon : versoj ĝenerale ne estas vaste popularaj, krom la Zamenhof-poemoj, kiuj ja iĝis por la esperantistaro pli ol simplaj poemoj, akirinte la rangon kaj rolon de religiaj himnoj. Sed krom ili kaj eble kelkaj versoj de aliaj aŭtoroj, la esperantlingvaj poemoj ne vekis laŭtan resonadon. Nun venis la Baghy-poemoj kaj ilia dolĉa muziko, ilia facilalta ritmado, ilia fortmuskola impeto enfrapis sin en la orelojn kaj korojn de la esperanta publiko. De tiam la esperanta verso estas afero ne nur de la poetoj kaj recenzantoj.

Ankaŭ kiel satira prozisto li estas vojrompanto sur tiu ĉi tereno li verkis liajn ĉapitrojn en sia granda romano *Hura* kaj precipe estas mia korinfano la ruze mallerta, ĉarma figuro de Mihok, heroo de bonegaj Baghy-noveloj, kiu estas aparte sukcesa vivanta kreaĵo de Baghy, kvazaŭ vivanta persono el nia malgranda Esperanta mondo.

Nepridiskuteblaj estas la meritoj de Baghy, ĉirkau la antaŭpreparo de la venonta esperanta dramo. Li mem verkis teatraĵojn ; en ili kaj en tiuj de aliaj aŭtoroj li aktoris kun granda sukceso ; kaj kiel reĝisoro li faris miraklojn : el kelkaj bonvolaj, inteligentaj ; sed neniel fakspertaj amatoroj li ellogis tiel brilajn prezentadojn, ke, trankvile ni povas diri, li atingis la maksimumon, kion oni povas atingi. Kaj li semis grajnon, kiun la estonto rikoltos...

* * *

Dr. med. ĉefkuracisto en hospitalo por infektaj malsanuloj, docento ĉe la budapeŝta Universitato, post la milito aktiva partopre-



nanto en la Esperanto-movado, gvidinto de kursoj, ĉefredaktoro de Literatura Mondo en ambaŭ periodoj ĝis nun, verkanto de sinsekve aperantaj libroj ; jen la eksteraj datoj el la vivo de tiu granda Esperantisto kaj granda homo, kiun ni konas sub la nomo de Kolomano Kalocsay.

Per verstradukoj li komencis sian verkistan karieron kaj ankaŭ nun se la orelon de Esperantisto ekfrapas lia nomo, tuj venas en la kapon memorbildo pri iu el liaj majstraj traduklibroj. Kaj vere, la Kalocsaytradukoj surhavas ian individue karakterizan stampon, kiu ne nur mankis en ĉiu tradu-

kajo, aperinta antaŭ li, sed kiu levas liajn tradukojn alte super la ĝistiaman akiraĵon de la Esperanta literaturo. Kio estas la sekreto de liaj tradukoj? Bonajn tradukojn ni ja trovas antaŭ li, sed la ĉefa kaj plejparte la sola gajnaĵo de tiuj tradukoj estis la *forma solvo*. La lingvo ankoraŭ ne estis ellaborita kaj la tuta energio de la tradukanto elĉerpiĝis en la serĉo de forma solvo, por io plia ne plu restis forto. La esenca supereco de Kalocsay kuŝas tie, ke la perfektecon de la formo li levis tiel alten, ke la forma solvo por li ne plu estas problemo, do li havas energion por transplanti ankaŭ la humoron, individuan guston de la tradukota verko kun ĉiuj ĝiaj nuancoj, koloroj. Jes, Kalocsay estas kreanta ĝardenisto, kion li transplantas, tio enradikiĝas en la Esperanta humo kaj ekfloras je mirinda nova vivo, kelkfoje la nova vivo radias pli riĉan brilon ol la originalo. Vivanta voĉo parolas el tiuj ĉi libroj, nenie aŭdiĝas la raŭka knarsono de artefariteco, nenie tramalsekiĝas postsignoj de ŝvitado en laboro. Tre simpla estas la sekreto de tiu ĉi nova tradukarto. En la tradukita verso Esperanta la lingvo la unuan fojon ĉi tie vekigis je vivo. Tia eksterordinara rezulto ne povis resti sen vastefikaj sekvaĵoj. Kalocsay ne apartenas al la tipo de memcentra memrigardanta artisto, kiu eble naskas artverkojn, sed de kiu neniu povas lerni ion ; ne, Kalocsay donis ne nur ekzemplon, li faris pli : li konsciigis en si mem sian labormetodon kaj cedis ĝin al komuna trezoro. Tio klarigas, ke lia tradukarto portis kun si ĝeneralan ekfloron de la Esperanta verstraduko : de tago al tago aperas novaj junaj talentoj ; eldoniĝas Antologioj, kiuj en inda kvanto kaj artnivelo prezentas la poezion de iu nacia literaturo. Kaj ĉio ĉi ne estis imagebla antaŭ la eklaboro de tiu ĉi perfekta artisto kaj certmana edukanto.

La signifo de la originala poezio de Kalocsay kuŝas en tio, ke ĝi unue levis la Esperantan poemon egalranga al iu de la elitaj naciaj literaturoj. Unue ni sentis, ke la modesta rivereto de la Esperanta poezio kontaktiĝis kun la giganta fluo de la eŭropa liriko. Komence de la plej sekrete delikataj animvibradoj, de la plej embuskaj subkonsciaĵoj de la plej veluraj humornuancoj, de la plej petoleme

ĉarmaj amoludoj ĝis la tragika malheligo de mondproblemoj, ĝis la katastrofa kaosigo de individuaj kaj kolektivaj sortoj, ĝis la fine tamen venkespera volo de la homo de l'estonto : jen problemoj, sentoj, humoroj de moderna homo, kiuj en Esperanto unue eklaŭtis sur la bronzo sonanta de Kalocsay !

Erarus tiu, kiu pensus, ke la lingvisto estas ia aparta homo en Kalocsay. Ke la poeto kaj scienculo estas apartaj personoj. Ne, lia okupiĝo pri la lingvista flanko de la movado estas nur alproksimiĝo al la sama celo, el alia flanko. La celo, vivo de la lingvo kaj ĝia evoluigo al tia nivelo, ke ĝi estu kapabla esprimi ĉion, kion homa cerbo kaj koro diktas, jes, li celas fari la lingvon inda ilo por la homaro, strebanta alten. Li rekonis, ke por fari altnivelan literaturon, ne sufiĉas la deksex reguloj kaj la trunka vortaro de la fundamento : estas bezonataj nuancoj kaj en la vortoj (neologismoj) kaj en la sintakso. Humile kaj kun fera volo li sin ĵetis al studado de la ekzistanta lingvo-materialo, ĉefe al la verkoj de Zamenhof kaj la rezulton de sia laborego li transdonas al ni en la Plena Gramatiko kaj en siaj lingvistikaj artikoloj. Kaj al la leganto malkovriĝis tute nova mondo : neniam ankoraŭ aperis al ni Esperanto en formo tiel muskola, tiel vivoŝvela, kiel en la verkoj de la plej genia malkovranto de ĝiaj leĝoj.

La redaktora seĝo portis al Kalocsay multegan laboron, sed lia redaktoreco portis al la Esperanta literaturo multegan benon. Lia bonvola reviziado, liaj ĉiam modeste prezentitaj valoregaj konsiloj, helpis al multaj talentaj samideanoj ; lia pasio al malkovro de novaj talentoj konatigis multajn novulojn al la publiko, lia fantazio riĉa je ideoj, lia nelacigebla instigemo al laboro jam naskiĝis multajn librojn, artikolojn... Kaj certe oni jam rimarkis, ke Kalocsay havas ian propran manieron de korektado : ankaŭ sur tiu ĉi tereno li sekvas la principon de neceso kaj sufiĉo, nome li korektas nur la nepre necesajn, sed lasas validiĝi la individuan stilon de la korektito.

Multaj imagas Kalocsayn kiel nuran literaturiston, kiun la movada parto de Esperanto ne multe interesas. Eraro ! La movado interesas lin same, kiel la literaturo. Li rekonis, ke Esperanto nur helpe de sia literaturo povas ĝisatendi sian ĝeneraliĝon, ke la estonto de la lingvo baziĝas sur sia literaturo, tial li akcentas ĝian gravecon. Por li la literaturo ne estas io memcela, kiel ankaŭ la lingvo ne estas memcela : en lia mondkoncepto ambaŭ servas la venontan pli perfektan homon.

Ni deziru al niaj jubileantoj, ke la fruktoplajn dudek kvin jarojn sekvu ankoraŭ multaj-multaj jaroj plenaj de sano kaj sukcesa laboro.

L. TOTSCHÉ.

Varbu por Via Revuo !

La Amuleto (Hina Rakonto)

Kiam la Jang Tse Kiang elbordiĝis kaj dekmiloj da kamparanoj dronis en kotaj ondoj, floris malgranda, maldelikata lulilo kun fluo de la flava rivero. La Dioj protektis ĝian vojaĝon, kondukis ĝin mallaŭte preter la bolantaj akvoturniĝoj, laŭlonge de akraj rokoj, ĉar la eta Kiu Ling, kiu troviĝis en la lulilo sur rizpajla matraceto, portis sur sia brusto kiel amuleton tranĉitan el ligno de la sankta acero, la drakon kun la glavo.

Kiam Kiu-Ling estis dekjara, eksplodis epidemio en la urbo Han-kon, kie li estis edukita ĉe siaj adoptgepatroj. La tifo dezertigis preskaŭ la duonan urbon, sed la knabo Kiu-Ling kuris trankvile tra la infektitaj stratoj kaj venis en la domojn. Li restis sana, ĉar sur sia brusto li portis la amuleton, la drakon kun la glavo.

Dek jaroj poste eksplodis la kaldronejo de armilfabrikejo en Shanghai. La tegmento malsuprenfalas, la muroj disrompiĝis kaj sub la fumantaj ruinoj kuŝis la frakasitaj korpoj de dudek kulioj. Nur Kiu-Ling leviĝis el la ruinoj. Li portis la amuleton. Baldaŭ poste eksplodis milito. Sur la malriĉaj provincoj de la granda ŝtato sin jetis la impertinenta kaj malregita soldataro. La kamparanoj estis ekspluatataj, iliaj rizkampoj detruataj, la lando prirabata kaj nur, ĉe la Hwai montaro, kiam la plej bona armita konstanta armeo sub centra aŭtoritato sin metis kontraŭ ĝi, haltiĝis la bandita trupo. Ĉe tiu armeo troviĝis ankaŭ la soldato Kiu-Ling. Oni ne demandis al li, ĉu li ŝatis esti soldato. Certan tagon troviĝis lia nomo sur listo, pendanta en la armilfabrikejo. La generalo faris paroladon pri la uneco de la popolo. Kia-Ling ricevis uniformon kaj armilon. De post tiu tempo li batalis. Li partoprenis la grandan batalon al la Jento. Estis la unua malvenko de la revolucia armeo. La neĝplenaj kampoj estis ruĝkolorigitaj pro la sango, ĝis en la printempo. Kiu-Ling defendis sin kuraĝe. Li troviĝis en la unuaj vicoj kaj pafis sur la malhelaj punktoj kiuj provis forkuri el la malalta arbaro al la alia flanko de la neĝebenaĵo. Sed li ne havis la senton, troviĝi en batalo. Certe ankaŭ li portis en sia koro la idealon de granda unuiĝa, feliĉa ŝtato. Sed ĉio preterpasis lin kiel en ebriceo. Iasis lin sen emocio kaj li akceptis la militon, la soldatiĝon kaj la pafon kiel taskon, kiun la Dioj al li destinis.

Grenadoj faris abomenajn funelojn ĉirkaŭ li, maŝinpafiloj forfalĉis tutajn armeformaciojn kaj Kiu-Ling vidis, kiel tio ne tuŝis lin, mortigi siajn kameradojn. La morto estis por li io nekonata, io tute fremda. Li ne konis ĝin. Li portis la amuleton, la drakon, kiu portis glavon.

Estis en la punkto de la kuratako kiu devigis la nordan militistaron reiri. Estis malvarmege. Pala luno troviĝis sub la montoj. En la polvo de la valo lumigas la bivakfajroj de la suda armeo. La batalo estis gajnita.

Kiel eble proksime kuŝas la lacaj soldatoj apud la fajroj, varmiĝis siajn rigidiĝintajn membrojn, dormis elĉerpitaj. Apud Kiu-Ling kuŝis juna soldato. Li nomiĝis Pen-Tu, kamparano el la distrikto

Fo Kien. Unue li rakontis pri sia naskiĝvilago, pri la kampoj, la aero kaj pri sia edzino. Li volis reiri hejmen, kiel eble baldaŭ kaj ne plu esti soldato. Tiam li endormis kun la kapo sur la brusto de Kiu-Ling. Ili kuŝis la unua apud la alia kaj varmigis sin kiel hundoj. Subite pafoj falis. Fortegaj kaj akraj ili disŝiris la noktanta silenton. La bruo venis de supre de la intermonto. Manĉuriaj liberpafistoj, estis rekoneblaj al la eksono de la pafiloj.

Krioj en la tendaro, ordonoj kaj la voĉo de la generalo. Kvardek soldatoj estis komandataj por detruo la neston en la montpasejo. Inter ili estis la nomo de Pen-Tu, la juna kamparano el la distrikto Fo Kien. Li ekstaris, prenis sian armilon kaj metis sian ĉapon bone. Kiu-Ling staris post li. Ankaŭ komprenis la senutilecon kaj la danĝeron de la entrepreno. Vidiĝis la montpasejo, hela de la luno lumigita ebenaĵo, aŭdiĝis la pafoj de la malamikaj antaŭpostenoj.

Pen-Tu klinis la kapon, la flagro de la estingiĝanta fajro lumigis sian vizaĝon kaj li ekparolis hezitante : « Kiam vi venos en Fo Kien, kamarado... » Por la dua fojo eksonis la ordono. Pen-Tu levigis sian manon kiel saluto, sin turnis kaj iris tra la vicoj al la tendo de la generalo. Subite estis Kiu-Ling post li, malbutonumis sian uniformon, prenis de la nuda brusto la amuleton kaj pendigis ĝin ĉirkaŭ la kolo de Pen-Tu.

— Redonu ĝin al mi, kamarado, kiam vi revenos.

Pen-Tu kapmovis. Tiam devigis la tria ordono al li foriri. Kiam la kvardek soldatoj forlasis la tendaron, troviĝis Pen-Tu en la unuaj vicoj. Kiu-Ling kuŝis sola apud la fajro. Li havis malvarmon.

Post unu horo denove sonis la alarmo. Dum kiam tie supre en la montpasejo la batalo daŭris, dua malamika trupo estis posteninta malsupre en la valo kaj trafis kun maŝinpafiloj la limojn de la tendaro. Denove sonis ordonoj de la generalo. Tuta bataliono estis alvokita. Kiu-Ling estis inter ili.

Sed kiam li nun en vicoj de dekdu transiris al la kuratako, subite atakis lin sento ĝis nun ne konata. Ne estis timo, sed estis la kompreno, ke la vivo estis io grandioza kaj fortega. Li prenis dum li kuris al sia brusto, ĝi estis malplena. Kaj por la unua fojo li komprenis, ke la kamaradoj falis trafitaj post li. Li aŭdis iliajn kriojn kaj komprenis, ke estis mortkrioj. Li vidis sangon kaj vidis, ke estis varma, fluanta sango. Antaŭ li falis pafoj. Tiam li sentis baton kontraŭ sia koro, li ne plu aŭdis la pafojn, ĉio krepuskis ĉirkaŭ li, tiam estis trankvile, stranga trankvile kaj li falis antaŭen en la neĝo.

Kiam la tagiĝo ekkomencis, la lastaj malamikaj trupoj estis ruŝitaj de la armeokorpuso de la generalo. Nur supre en la montpasejo estis la unuaj kvardek soldatoj komplete detruitaj de la Manĉuriaj liberpafistoj kaj pafitaj kiel leporoj en la neĝo. De la kvardek nur unu revenis, Pen-Tu la kamparano el la distrikto Fo Kien.

Tradukis Jos. VANDERSTEEN.

Esperanto op Radiogebied

Het radiotoestel heeft stilaan een vaste plaats verworven in den huiskring. Voor velen is het een onmisbaar iets geworden, evenals de dagelijksche krant. Het beteekent een oor, immer gespist op de geluiden der wereld, een kijkvenster langs waar we een blik werpen op binnen- en buitenlandsche gebeurtenissen. Zonder inspanning, met haast onmerkbare beweging der vingertoppen, weten wij in schakelen, op te vangen, scherp te zetten. We doen het machinaal, dagelijks, en zijn niets verwonderd dat de wereld in onze huiskamer getooverd wordt. We vinden het leuk, door den ether te dwalen en in de vlucht verschillende stations op te vangen. Hoe wonderbaar : ons toestel schijnt geen grenzen te kennen. Wij, menschen, kennen die wel.

Wij genieten van de muziek, ons zoo kwistig langs etherischen weg aangeboden. Vaak gebeurt het, dat plots, na een slotakkoord, de klanken eener vreemde taal ons oor treffen. Hoe vervelend vinden we dit niet ! Graag hadden wij verstaan... Immers, waarom zou deze voordracht minder belangrijk zijn dan de muziek van daareven ? We trekken ons dan maar terug op eigen taalgebied en beperken ons bij dien engeren kring.

Als Esperantisten ontsnappen wij reeds grootendeels aan dezen algemeenen regel. Wij kennen de 48 Europeesche radiostations die ons regelmatig op Esperanto-uitzendingen vergasten. Wij beluisterden een flink aantal der 1400 voordrachten, lezingen lessen of tooneelstukken welke de zenders van 15 landen, gedurende 1935, op hun programma plaatsten.

Op geen enkel gebied is het nut eener internationale taal klaarlijker dan op het gebied der radio. Ook mogen we met voldoening vaststellen dat Esperanto stilaan een steeds waardiger plaats bekleed in den ether. De nationale radio-instituten van talrijke landen, hebben hier een prachtig middel ontdekt voor hunne buitenlandsche propaganda en weten er ruim gebruik van te maken.

Indien wij in acht nemen, dat de Esperanto-uitzendingen der talrijke kleine zenders van plaatselijk belang, in de statistiek dienaangaande door « Internacia Radio-Serv » afgekondigd, niet in aanmerking werden genomen, dan mogen we waarlijk beweren dat Esperanto een niet te onderschatten rol vervult op radiogebied. Frankrijk telt 11 stations welke regelmatig in Esperanto uitzenden, Oostenrijk telt er 7, Noorwegen 6, Tsjecho-Slovakije 5, Zweden 4, Estonië, Italië, Nederland Polen, Portugal, Sovjet-Rusland en Zwitserland elk 2, Joego-Slavië 1.

Dat de Esperanto-uitzendingen een gretig gehoor vinden bewijst het volgende. Radio Brno onderscheidt zich op bijzondere wijze door haar uitzendingen in de internationale taal. Niet alleenlijk cursussen, voordrachten, lezingen en mededeelingen worden door haar uitgezonden maar zelfs operas en operetten. Onlangs, ter gelegenheid eener uiterst geslaagde uitzending ontving radio-Brno de lofuitgingen van 1178 luisteraars uit 23 verschillende landen ! Zoiets is alleen bij middel van Esperanto mogelijk.

De eerste Herfst-uitzending van vermeld station werd door den bestuurder ingeleid met een Esperanto-voordracht waarin o. m. de verklaring voorkwaam « Het gebruik van Esperanto door onze nationale zenders is geen experiment meer, maar een welbegrepen volleding van de normale programma ». Tot een dergelijk besluit kwam insgelijks den bestuurder van het radio-instituut van Warschau, waar hij verklaarde dat de regelmatig in Esperanto uitzendingen en voordrachten over Polen hun doel niet hadden gemist maar in de wereld een ware belangstelling hadden gewekt voor dat land.

Het is opvallend, dat Esperanto in vele landen in aanzien staat en een praktische toepassing vindt terwijl wij op niets degelijks kunnen bogen. Onaangezien de uitzendingen van een tweetal kleine zenders en enkele mededeelingen over de Esperanto-beweging door de nationale zender, mogen wij op geen resultaten wijzen.

Het regeeringsprogramma behelst het oprichten van een zelfstandig Vlaamsch Radio-Instituut voor de uitzendingen in het Nederlandsch. Bij dat instituut aan te dringen op het gebruik van Esperanto, is een taak welke voor onze Ligo in aanmerking komt.

E. CORTVRIENDT.

Diversaĵoj

AELA sciigas siajn membrojn, ke la libro « Verkaro de FEZ » estas ekspedita ĝis la 1-a de aŭgusto al ĉiu aboninto, kiel kvina libro de serio C 1935.

* * *

Esperanta Klubo Ljubljana sciigas vin, ke ĝi eldonis 8 belegajn vidajkartojn (fotografajojn) de la bela urbo Ljubljana kun esperanta teksto. Ili estas tre aĉetindaj. Ĉiuj 8 ekzemplerojn kostas nur 4 respondkupojn. Oni povas mendi ankaŭ nur 2, 4 au 6 ekzemplerojn por 1, 2 au 3 respondkuponoj. Ĝi ofertas ankaŭ la libron « LA TREZORO DEL ORAGISTO ». La romano verkis konata kroata verkisto Aŭgust Senoa. El kroata lingvo tradukis ĝin Fran Kolar-Krom. Tiu romano kun la portreto de l'aŭtoro havas 290 paĝojn kaj kostas nur 3 respondkuponojn kun afranko.

Cion oni mendas direkte ĉe : ESPERANTA KLUBO, LJUBLJANA, DELAVSKA ZBORNICA — Jugoslavio.

* * *

Por la esperantistaj radio-amatoroj, ekzistas speciala gazeto « Internacia S. O. S. Bulteno ». Ĝi aperas ĉiumonate kaj dum vintro ĉiudusemajne. Ĝi anoneas la programojn de ĉiuj esperantistaj radio-elsendoj tag-po-tage. Oni povas peti senpagan specimenon al la redaktanto ALGLAVE M., 150, rue Cronte-Voye, BLANC-MISSERON, Nord, Francujo.

JARABONO : Francujo kaj landoj aliĝintaj al Interkonsento de Stockholm : 9 fr. fk. aŭ 6 respondkuponoj.

Aliaj landoj : 12 fr. fk. aŭ 9 respondkuponoj.

La gazeto estos senpage sendita al ĉiuj, kiuj abonos kvar s-anojn al nia organo. Do, se oni varbus kvin novajn legantojn, oni pagus nur al ni kvar abonojn kaj la bulteno estos sendita al la kvin samideanoj.

Kompreneble informoj pri la esperantistaj radiodissendoj estas ĉiam plezure ricevataj.

Anoncoj estas akceptataj ankaŭ volonte.

VARBU LEGANTOJN AL « INTERNACIA S. O. S. BULTENO ».

La esperantistoj havos la radiodissendojn, kiujn ili meritos !

* * *

Ĵoj kun klariga teksto en la lingvoj germana, franca, angla kaj en Schönbrunn, de Karlskirche, Ŝtata Operejo, Schwarzenberg-placo de Aŭstrio jam baldaŭ instigos aliajn ŝtatojn al imito !

Por nia Revuo

Gebedo Ronse : 5,— Fr.

Grupa Vivo

ANTWERPEN — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Kvankam ni finfine travivas sufiĉe bela somertagojn, la kapoj restas freŝaj en nia grupo, kie oni daŭre kaj sub bona gvidado de nia prezidanto serioze laboras. Ni diskutis dum la kunvenoj pri seriozaj esperantaj aferoj. La lasta kunveno estis certe unu el la plej interesaj, ĉar nia lerta amiko Sus Mortelmans pruvis al ni ke « akuzativo » estas nur nomo, sed fakte ne ekzistas. Dum sekvontaj kunvenoj ni certe denove atakos lin pri tiu « N » afero. La ekskursoj faritaj al Bouwel, St Lenaerts kaj dum la feriaj tagoj estis bone ĉeestataj de la geanoj. Mi povas certigi ke tiuj amuzaj tagoj certe helpas al plia amikiĝo de niaj geanoj.

MECHELEN — LA ESTONTO

Malgraŭ la feriaj tagoj sufiĉe da membroj regule kunvenis okaze de la semajnaj grupvesperoj.

Sekve al la cirkulero de « Flandra Ligo » nia grupo tuj oficiale aliĝis. Ni nun konkursu por iĝi la plej agema, la plej multnombra grupo. Tio ne estas utopio, se ni firme volas kaj konstante propagandas por la afero kaj la estontaj lecionoj.

Karaj gemembroj ne forrestu el la semajna kunveno sen serioza kialo, vi certe ne bedaŭros ĝin, ĉar gaje alternas kantadoj, kartludadoj, vortludoj kaj agrablaj interparoladoj.

RONSE — « LA PACA STELO ».

La somero alproksimiĝas al la fino malgraŭ la rilata pluvema vetero, ĉiuj niaj ekskursoj bonege sukcesis.

Al « Deurle » ni ekskursis kun 20 personoj kies bicikloj preskaŭ senescepte estis ornamitaj per la propaganda flageto esperanta.

Ni ne fanfaronas sed tamen povas esti dirita ke kvankam « pacemaj stelanoj » ni ankaŭ estas laboremaj propagandistoj, ĉar nek unu merkredon, ni dormis sed ĉiam daŭre ni kunvenis laŭ nia monata programo.

Fine de la monata, la estraro kunvenis por pridiskuti la propagandon por la remalfermo de niaj kursoj lokaj, kaj pri kiuj ni donos pliajn detalojn en la sekvonta numero.

Nia grupo ankaŭ sin okupas pri eventuala organizo de donota kurso en **Sottegem**.

Ni provos interkonsenti kun la kelkaj gesamideanoj el Oudenaarde, pri komuna laboro rilate la kursojn kaj je la taŭga momento neniu grupano povas foresti por doni al ni ĉiuj helpan manon.

Nia samideanaro gratulas S.ano Broodecoorens G. en Bruselo por la posteno de Prezidanto kaj esperas ke la grupo tiel bone funkcios sub lia gvidado kiel antaŭe, pri kio ni tute ne dubas, konante la kapablecon kaj laboremon de nia simpatia eksmembro.

La angulo de la serĉemuloj

Ni forlotumos unu premion inter la ensendint(in)oj kiuj bone solvis la problemon 10 kaj unu por la problemo 11.

La solvoj estu ensendataj, antaŭ la 5a de Oktobro rekte al S.ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen. Bonan ŝancon !

PROBLEMO 10 — SILABPROBLEMO

Formu per la silaboj a, a, ad, ant, de, di, ism, jud, ka, kres, lan, ma, ma, mad, mi, mi, ni nistr. no, rap, si, so, sul, tan, tat, ter, ti, ti, to, u, ul, ver, radikojn de substantivoj je la sekvanta difino :

- 1) Religio de la Hebreoj.
- 2) Ĉefa lernejo.
- 3) Neŝangebla landa decido al alia lando.
- 4) Lumilo.
- 5) Legolibro, por studado de lingvo.
- 6) Direktanto, reganto.
- 7) Muzika fantazia verko el popolaj melodioj.
- 8) Homo sen konstanta loĝo.
- 9) Supera lernejo.
- 10) Mahometana aŭtokrata regnestro.

La unuaj literoj de la trovitaj vortoj formos la nomon de famkonata mortinta esperantisto.

PROBLEMO 11 — MUSHISTORIO

3 katoj manĝas 3 musojn en 3 minutoj. Kiom da katoj estas necesaj por manĝi 10 musojn en 10 minutoj.

* * *

Solvo de Problemo 8 : r, ar, aro, ardo, radio, radiko, ekadori, kriado, kadro, rado, rod, or, o.

Ni publikigos la gajnintojn de la premioj en nia sekvonta numero. **PREMIOJ.** Ni ĉiam kun danko akceptas premiojn por niaj kruĉvortoj kaj aliaj problemoj.

F. VOLDERS

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Ranson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

AFDEELINGEN :

Aalst: « Pioniro ». Sekr.: Denderstraat, 20.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Statiesstraat, 156, Berchem.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto-Grupo ». Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. van Humbeekstr., 3.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.
Leuven: « Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.
Mechelen: « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.

VERTEGENWOORDIGERS :

Arendonck: A. De Troeyer, Gasthuisstraat, 100.
Assche: L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Gent: F-ino J. Terryn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Leuven: « Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
Vichte: G. Faveere, Statiesstraat
Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergaderingen te Gent, betrekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en vertegenwoordigers uitgenodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schriftelijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben vóór 15 Augustus. De andere zullen opgenomen worden in de volgende nummers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit. Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekretariaat.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

OSTENDO

Hotel-Restaurant
VROOME

Bulvardo Rogier 20. Tel 37

Moderna komforto — Moderaĵ
prezoj — Varma kaj malvarma
akvo fluanta.

Prenu urbotramon 5 aŭ 6

Varbu

Abonantojn

kaj

Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaat, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la
7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO
Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Speciale rekomendita Restoracio